

Annette von Droste-Hülshoff,

Lastaj vortoj (0)

tradukita de Manfred Retzlaff

Laŭvorta Esperantigo

Amatoj, kiam forpasis mia spirito,
ne postploru min per iu larmo;
ĉar tie, kie mi restadas, tie estas paco,
tie lumas al mi eterna tago.

Tie, kie ĉiu ter-aflikto estas malaperinta,
ne foriĝu via bildo al mi,
kaj mildigon por viaj vundoj,
por via doloro volas mi elpetegi.

Se dum la nokto blove svingas siajn seraf-
flugilojn
la paco super la mondo-regnon,
ne pensu tiam plu pri mia tombo,
ĉar el la stela spaco mi salutas vin.

...

Annette von Droste-
Hülshoff,

Lastaj vortoj (2)

*tradukita de Manfred
Retzlaff*

2a versio

Karuloj, kiam pasis mia
Spirit', pri mi ne ploru
vi;
Ĉar lumas jen en paco
Dia
Eterna tago ja al mi.

En tiu senaflikta foro
Memoru daŭre mi pri vi,
Por viaj vundoj kaj do-
loro
Mildigon volas peti mi.

Se venas kun flugilo sia
La nokta paco al la Ter',
Ne pensu plu pri tombo
mia,
Salutas mi el stela sfer'.

...

Annette von Droste-
Hülshoff,

Lastaj vortoj

*tradukita de Joseph Ferdi-
nand Berger*

Amatoj, kiam min forlasis
spirit', ne ploru do pro mi!
Por paca ekzistad' min
kaŝis
en brila tag' la bona Di'.

Ne estas plu ĉagreno tera.
Eternas via bild' ĉe mi.
Mi petos pri balzamo vera
por vundoj kaj dolor' de
vi.

Se svingas Pac' en nokta
ombro
Serafflugilojn super Ter',
ne pensu plu pri mia tom-
bo!
Salutas mi el stela sfer'.

...

Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 - †1848-05-24) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2004-05-16.

Arg-160-475 (2004-05-16 17:17:06)

Proksimuma laŭvorta Esperantigo de la origina germana-lingva teksto

Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 - †1848-05-24) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2004-05-16.

MR-311-5 / Arg-160-474 (2004-05-16 13:52:23)

La trian strofon mi, Manfred Retzlaff, ŝanĝis iom laŭ la modelo de la traduko de Josph Ferdinand Berger, uzante ankaŭ la rimvortparon "Ter' - sfer'". En mia unua tradukoprovo de l' 26.08.1997 resp. de l' 15.05.2004 mi iom tro ofte uzis la rimvortojn "mi, vi, ĉi". Tio certe ne estas tre bona solvo kaj efikas iom ĝena.

Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 - †1848-05-24) en Esperanton de JOSEPH FERDINAND BERGER (*1894-10-07 - †1976-03-28) en 1958.

Arg-160-467 (2009-11-22 09:37:58)

Tiu ĉi traduko de la poemo estas unue publikigita en 1958, ĝi aperis en la Esperanto-revuo "Norda Prismo", n-ro 58/2, sur paĝo 74. Vidu ankaŭ la tt-ejon "<http://donh.best.vuh.net/Esperanto/Literaturo/Re-vuoj/np/np5802/lastaj.html>" de s-ro Donald Harlow el Pinole CA-94564, Kalifornio. Malgraŭ la supra indiko la poemo ne estas verkita de la poetino mem, sed - laŭ pli nova scienca ekkono - de ŝia nevino Elisabeth, post la morto de Annette von Droste-Hülshoff. Oni ĝis nun nur atribuis la poemon al Annette von Droste-Hülshoff. Pri Joseph Ferdinand Berger rigardu ankaŭ la retejon http://wapedia.mobi/eo/Joseph_Ferdinand_Berger#2..